

La muzeoj de La Chaux-de-Fonds kaj de la ĉirkaŭaj lokoj  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 565, 1974.08.07 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintajn semajnojn ni prezentis al vi la urbon La Chaux-de-Fonds, kie Internacia Ferio Altlernejo okazigos kurssesiojn. Vi povis ricevi antaŭ-ideon pri la riĉeco de la migrad-eblecoj en la montaro Ĵuraso. Sed dum la liberaj tagoj ne ĉiam bela vetero estas je la rendevuo. Pro tio ni hodiaŭ prezentos al vi, kion vizitemuloj povas fari dum la pluvaj tagoj. Temas pri stud-vizitoj.

A.- Unue en La Chaux-de-Fonds mem ekzistas belkaj muzeoj. Inter ili la kamparana muzeo kaj la internacia horloĝ-muzeo prezentas neordinaran intereson.

Cl.- La kamparanan muzeon starigis antaŭ kelkaj jaroj urbanoj, kiuj volis pozitive reagi kontraŭ la detruemo far la konstruantoj de amasloĝejoj. Helpe de alvoko al la malavareco de la publiko ili akiris farndomon detruotan kaj ĝin renovigis. Alfluis donacoj ne nur de mono, sed ankaŭ de plej diversaj laboriloj kaj kamparanaj mebloj. Tiel nun estas eble akiri precizan ideon pri la vivo de la kamparanoj en la ĵurasa montaro. Registraĵo eĉ permesas fari al si ideon pri la franca dialekto, kiun parolis la loĝantoj de La Chaux-de-Fonds antaŭ kelkaj generacioj.

A.- Tiu kamparana muzeo situas piede de giganta moderna amas-loĝejaro. Tiu apudesto atestas pri du epokoj. Du fasadoj de aliaj kamparanaj domoj detruitaj estis last-minute savitaj. Nun ili ornamas oldulejon, kies ĝardeno formas unu tuton kun tiu de la kamparana muzeo. Komentariita vizito de tiuj domoj alportas supervidon pri la evoluo de la konstrustiloj de la regiono.

Cl.- Sed ni ne forgesu, ke la kamparanoj ankaŭ estis horloĝistoj. Ni iru al la internacia horloĝ-muzeo, kiun la urbo La Chaux-de-Fonds ĵus finkonstruas sub publika parko. Tiu muzeo prezentos la riĉaĵojn, kiujn iom post iom amasigis la horloĝ-muzeo, tio dank' al la malavareco de la horloĝistoj, industriistoj kaj de la urbo mem. Ĉiu mur-, poŝ- aŭ brak-horloĝo ekspoziciita estas juvelo. Kaj estas eble vidi horloĝiston je la laboro. Filmoj prezentas diversajn aspektojn de la temp-mezurado.

A.- Se oni volas havi bonan ideon pri la horloĝ-industrio kaj ties fakaj sub-branĉoj, oni devas nepre viziti tri aliajn muzeojn : tiujn de la najbaraj urboj **Le Locle** kaj **Neuchâtel**, kaj tiun de la vilaĝo **L'Auberson**.

Cl.- Ni unue iru al la kastelo de la montoj en la urbo **Le Locle**. En tiu histori-muzeo, kiu estas la frukto de la laboro de mecenato, oni povas admiri ne nur eksterordinaran kolekton da plej diversaj horloĝoj kaj temp-mezuriloj, sed ankaŭ vicon da aŭtomatoj, kiuj lasas neforgeseblan impreson. Filmo detalege montras, kiel ili funkcias kaj kiel ili estas konstruitaj. La feino Karabos pene marŝas helpe de baŝtono. Sur man-spegulo troviĝas rozeto. Ĝi malfermiĝas kaj aperas kantanta birdeto. Juvel-skatoloj prezentas plej diversajn moviĝantajn pejzaĝojn, tio kun muzika akompano. Antaŭ domo fluas akvofalo kaj naĝas cigno. Kaj sur la turo de katelo aŭ ĉe la sonorilejo de la preĝejo troviĝas horloĝo, kiu memorigas, ke temas pri temp-mezuriloj por riĉuloj. Grandaj murhorloĝoj havas en si orgenon kaj en kaĝoj kantas birdoj.

A.- Ankaŭ en la histori-muzeo de la urbo **Neuchâtel** oni povas admiri feaĵojn. Anstataŭ esti et-egaj kiel en **Le Locle**, ili estas apenaŭ pli malgrandaj ol veraj homoj. Dum ili desegnas, skribas aŭ muzikas, ili spiras kaj movas la kapon kaj okulojn. Ilia kreinto vere imitis la vivon. Knabo bel-skribas. Li trempas anser-plumon en inkujon, poste skuetas la plumon, por ke la troa inko forfalu, kaj li diligente skribas honore al la francaj reĝoj. Lia kamarado desegnas bestojn aŭ reĝ-portreton. Kiam la krajono forgesas pulveron, li ĝin forigas blovante. Fine klavincenistino ludas arion movante la fingrojn, spirante kaj turnante la kapon.

Cl.- En la vilaĝo **L'Auberson** troviĝas muzeo pri muzikiloj kaj muzik-aŭtomatoj. Ĝin vizitante oni revivas la tutan historion de la sonreproduktado. Malnovaj orgenetoj kunvivadas kun gigantaj muzikmaŝinoj. Akordionisto ludas okulumante al la fraŭlinoj. Virino batas la pigran edzon por lin laborigi, kaj tio je la sono de muziketo. Trumpetistoj salutas alvenantojn. Malnovaj disk-turniloj montras, kiel rapide evoluis la tekniko en tiu fako.

A.- Se oni volas enprofundiĝi en la studado de la temp-mezurado kaj de la fabrikado de aŭtomatoj, vizito de fabriko eblas. Ĝi montros, ke la trovemo de la ĵurasa loĝantaro ne mortis, eĉ se ĝi esprimiĝas alimaniere.

Cl.- Ankaŭ la tri teknikaj lernejoj de la kantono Neuchâtel atendas vizitantojn. Oni povas vidi, kiel centoj da studemaj gejunuloj sin pretigas por transpreni funkciojn en plej diversaj branĉoj de la etindustrio.

A.- Fine ni menciu, ke Neuchâtel posedas observatorion, kiu kun tiuj de Greenwich kaj Vaŝington, kalkulas ĉiam pli precize la tempon. Ankaŭ en tiu urbo troviĝas universitata lernejo pri la horloĝ-serĉado kaj serĉejo pri altprezaj metaloj. Ilia vizito povas tre interese forgesiĝi la malbelan veteron.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!